Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭde la 7-an de novembro 2019 per Skype.

(Protokolo aprobita la 2-an de decembro 2019)

Partoprenis:
Amelie Matt en Tromsø
Herman Ranes en Trondheim
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim ekde tagorda punkto 5.
Lars Sandbakk en Sandnes
Mario Machlik en Tromsø

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 3-an de oktobro
Aprobita kun du etaj korektoj.

2. Ekonomio, niaj bankkontoj kaj disponrajtoj
Nia konto en la banko NORDEA nun estas fermita, kaj la mono kion ni havis tie estas transmetita al konto en DNB. Mario kontaktis la bankon DNB por akiri disponrajton pri nia uzkonto al la nova kasisto kaj donis al la banko la necesajn dokumentojn. Ni ankoraŭ ne ricevis konfirmon de nia kasisto, Claude Rouget pri tio, ĉu li vere havas nun aliron al tiu konto. Mario ankoraŭ ne kontaktis la bankon SKAGEN, ĉar li unue volis esplori ĉu iu alia ol Anne Karin havis aliron al la kontoj de NEL tie. Ŝajne neniu en la estraro havas aliron al tiuj kontoj, eble Douglas havas.

3. ILEI en Norvegio
Nun en Norvegio nur 4-5 homoj abonas la revuon de ILEI. Ili verŝajne povas rekte membriĝi kaj pagi la abonon al ILEI, aŭ nia oficejo povas helpi ilin pri tio. Dum jaroj en la jarraportoj de NEL staris, ke la norvego ILEI sekcio estas dormanta, ne ekzistas iu ajn aktivado, nek ĉeestaj kursoj. Eble estas tempo oficiale malfondi la norvegan sekcion de ILEI. Ni tamen devas instigi instruistojn aboni la Internacian Pedagogian Revuon kaj esti membroj de ILEI. Ni ne konas la originon de la mono, kiu estas sur la konto « ILEI » en la banko DNB, sed ni devus konsideri fermi tiun konton kaj la monon transigi al nia ĝenerala konto.

4. Membrokotizoj 2020
La estraro konsentas pri la altigo de la kotizoj kiel Douglas proponis. La nova kotizo estos 380,- kronoj por ordinaraj membroj. Li kalkulis la 2020-kotizojn kaj abonojn laŭ la indico de SSB pri marto 2019 kiel kutime nia kasistino faris antaŭe.

5. Nepagintaj membroj, kaj membroregistrado
La estraro proponas, ke la limdato por pagi la membrokotizon estu la 1/3 ĉiujare. Pri tio ni devus informi la membraron en Norvega Esperantisto. Post la limdato (do multe pli frue ol nun) ni devus komenci la laboron por atentigi la membrojn nepagintajn. Jam tiam ni devus aldoni ruĝan ŝlipon al la gazeto, sendi atentigan leteron rete aŭ poŝte. Se la estraro (gvidantoj de la kluboj) povus ricevi la nomojn de la nepagintoj, tiam ili povus persone kontakti tiujn membrojn, kiujn ili konas.
Ni priparolis eblajn manierojn registri membrojn. Ŝajne estus bona solvo tion fari per kalkulformularo de Google Docs. Herman plu esploras la aferon kaj poste li kontaktos Douglas kaj helpos lin starigi novan sistemon.

6. Eventualaĵoj
Herman registris la novan estraron (sed ne eblis la anstataŭantojn) ĉe Brønnøysund registeret, kaj la estraranoj jam subskribis tie elektronike.
Li ankaŭ registris la novan estraron (tiukaze eblis kun anstataŭantoj) de Legaco Uhlen. La anstataŭantoj ankoraŭ ne subskribis ĉe la registrejo, Herman petos ilin fari tion.

La interkonsiliĝo daŭris 20:30 - 21:40
La venonta interkonsiliĝo okazos la 9-an de januaro 2020 je la 20.30.

Raportis Mario Machlik